Nr. 17
Maart 1985

# NOVAĴLETERO

Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista
Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep

Ver. Uitg.: R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge

Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85
van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge.
Steunende leden: 500 fr.

La ĝenerala jarkunveno de Flandra Esperanto-Ligo, al kiu vi estas kore invitata, okazos je sabato, 16 marto 1985, ekde 13.30 h. in Esperantodomo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.
Poste: agrabla kunestado (prezo: 200 fr. - antaŭmendota).
Por komuna veturado, kontaktu Roland Rotsaert (050/33.00.04).

La ĝenerala jarkunveno de FLEJA (Flandra Esperanta Junulara Asocio) okazos je dimanĉo, 17 marto 1985 je la 10a h.
Bonvolu kunporti vian lunĉon. La vojaĝkostoj estos parte repagataj, se vi avertas antaŭe.
Por komuna veturado, kontaktu André Ruysschaert (050/34.14.69).

Op 23 maart en 13 april a.s. wordt u verwacht op de laatste werkvergaderingen ter voorbereiding van het Brugse Markola Kongreso. (14 u., Visspaanstr. 97, 8000 Brugge, bij Katelijnepoort)

Op zaterdag 30 maart 1985: Esperanto-Bal te Antwerpen.
Voor verdere details: zie Esperanto-Panorama.

## Markola Kongreso

Dum la lastaj tagoj alvenis pluraj informpetoj el Francio. Ni esperas ke la nombro de francaj aliĝintoj finfine tamen atingos "normalan" nivelon.

La speciala aranĝo kun la Bruĝaj muzeoj ekde nun ne plu validas. Se vi (aŭ konatuloj) ankoraŭ aliĝos, vi pagu 1.050 anstataŭ 1.250 fr. kaj aĉetu enirbiletojn surloke.

## Pliaj aliĝintoj

59. Heleen De Geus, NL-1851 KP Heiloo
60. Gre Huyzer, id.
61. Gilbert Cardoen, Wervik
62. Edward Symoens, Heide-Kalmthout
63. William F. Edwards, Bournemouth, Dorset
64. Joan Edwards, id.
65. Marie-Claude Vandenbussche, Kortrijk
66. Georges B. Atkinson, London
67. Maurice Walsh, Sparsholt nr.Winchester
68. Heinz Schindler, D-5830 Schwelm
69. André D'Hulster, 8400 Oostende
70. Thérèse Boudt, 8400 Oostende
71. Grégoire Maertens, 8310 Brugge
72. Germaine Mallet, 8310 Brugge
73. Ghislaine Langagne, F-62230 Outreau
74. Dominique Deiber, id.

## Anonceto

Mi ŝatus akiri telefonlibrojn pasintjarajn de aliaj provincoj (eventuale kontraŭ okcidentflandra ekzemplero)

RR



## Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF)

Dum la venonta Universala Kongreso en Augsburg oficiale fondiĝos IKEF, laŭ iniciato de L. Mee kaj F.J. Braun. La iniciatintoj ĉeestos la Markolan Kongreson.

La celoj de la Fakgrupo estas i.a.:
- agado por eldonado de faka terminaro;
- eldonado de faka bulteno;
- subtenado de membroj agantaj por aranĝi negocojn per uzado de la internacia lingvo.

## Fondaĵo Antoni Grabowski

La Fondaĵo Antoni Grabowski komencis sian agadon dum la 67a UK en Antverpeno. Dum la 69a UK en Vankuvero ĝi disdonis la unuajn premiojn al niaj literaturistoj, kaj donis subvenciojn al UEA por eldona agado, por netranspagipovaj landoj...

La fondaĵo nun disponas pri preskaŭ 20.000 da usonaj dolaroj. La rentumo de la kapitalo estos uzata por Esperantista kultura agado. La agad-ebleco do dependas de la grandeco de la kapitalo.

Eblas subskribi al kapital-kuponoj de po 50 usonaj dolaroj. La kapitalon de la Fondaĵo administras la Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo.

Kontaktadreso por IKEF:
Mondkomerca Eldonejo Esperantista, P.B. 25041,
NL-3001 HA Rotterdam

Kontaktadreso por Fondaĵo Antoni Grabowski:
A.P. Goralski, C. Gral Fanjul 17-1D,
Santa Cruz de Tenerife, Espana

## Gezocht: Medewerkers voor Markola Kongreso

Functies:
- gidsen voor musea rond Dijver, Centrum, Kerken, Gezellekwartier
- drie of vier personen die tijdens het congres de "permanentie" willen verzorgen in de Brouwerij Henri Maes
- chauffeurs voor "transportservo"
- ...

Vereiste talenkennis: Esperanto volstaat.

Beloning: in geld nihil; qua sfeer: onbetaalbaar.

---

**71-A UNIVERSALA KONGRESO**
**Pekino, Ĉinio, 26 jul - 2 aŭg 1986**

Plia favora tarifo, valida ĝis 15 aŭgusto, 1985!

Jam kvincento da aliĝoj venis laŭ la escepte favora tarifo, kiu validis ĝis la fino de 1984. La Estraro de UEA nun fiksis novan tarifon, kiu estas sub la tarifo de la unua kotizperiodo, kiu validos ekde 16 aŭgusto, 1985. Jen la kotizoj:

| | |
|---|---|
| Kat. 1 (ne-membro de UEA) | 150 gld |
| Kat. 2 (individua membro de UEA) | 120 gld |
| Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA) | 90 gld |
| Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ja estas membro de UEA) | 60 gld |

La nederlanda Guldeno nuntempe valoras ĉirkaŭ 18 belgajn Frankojn